LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Apr-Aŭg. 2024 *56-a jaro* *N-ro 195-196*

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Lijsterbeslaan 13 - BE-9630 Munkzwalm
Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste
James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP

Antaŭ 100 jaroj



XVI UK en VIENO

6-13 VIII 1924

KARAJ GELIGANOJ, KARAJ GEAMIKOJ!

VORTOJ SPECIALE ADRESITAJ AL KIUJ NE HAVAS ALIRON AL RET-POŜTO!

Jam de troa tempo via redaktoro kaj prezidanto donis nenian ajn vivosignon pere de via organo LA VERDA LUPEO kaj certe iuj jam ekpensis, ke la Fakasocio ELF-AREK malaperis porĉiame kaj - tre malbonedukita! - senaverti iun ajn.

Tro ĝena kaj longa estus la tuta priskribo de kialoj de ĝia abrupta foriĝo. Temis pri, tre koncize dirite, sufiĉe serioza vivsituacio, kiun ankoraŭ nun estas malfacile plene mastri, sed mia espero, espero de serioza esperantino, estas, ke en baldaŭa estonteco, danke al viaj nepraj kontribuoj, nia Ligo reviviĝos, revigliĝos, iĝos denove stelulino en la Filatela kaj Esperanta kampoj. Se ne, tio atestus la onian perfidon kontraŭ niaj antaŭuloj, kiuj pene laborante eĉ sen la aktualaj teknikaj rimedoj plifaciligantaj oniajn agadojn, insiste kaj persiste, fide kaj fidele plenumis siajn taskojn portante antaŭen la verdstelitan torĉon, ekde 1968 ĝis nunaj 2000-aj jaroj.

Kaj realiĝos, se vi ĉiuj akompanos min per viaj sugestoj, artikoloj, komentoj, plibonigebloj, per laŭta voĉo laŭda aŭ mallaŭda: ĉiaokaze gravas via kunpartopreno, kunlaboro, subteno; ja, ankaŭ subteno, ĉar el multaj el vi mi ne plu ricevas kotizpagojn - certe, pri tio mi kulpas, pro mia longa silento, sed se, kiel antaŭvideble, kune kun vi ni sukcesos pluvivigi nian Ligon, bezonatas mono por pagi presadon, paperrismojn, kovertojn, inkojn, plus poŝtajn elsendojn ks. Mi restas ĉiam je via dispono.

En ĉi koverto oni trovos la *Apr-Aŭg 2024 LVL*-n; kiel eble plej rapide ĝin sekvos tiu decembra 2024 - aprila 2025, ĝis kiam en aŭgusto 2025 vi ricevos akurate la tiumonatan LVL, kiel estis kutimo antaŭ tiu ĉi longtempa interrompo, nome **trifoje** jare: Aprilo - Aŭgusto - Decembro.

Dankon pro la atento, via Elda Doerfler

ENHAVO

Elda DOERFLER - *Vortoj de via prezidanto*	2
Elda DOERFLER - *Antaŭ Cent Jaroj… la XVI Esperanto-Weltkongress Wien 1924*	3
James REZENDE PITON - *Alberto Couto Fernandes plurjardeka prezidanto*	11
Albert BOON - *Poŝtkarto de Harold Bolingbroke Mudie (1907)*	15
James REZENDE PITON - *Plilongigita "Turismo"*	19
Peter ZILVAR - *Gravaj Esperanto-Kolektaĵoj. Bonŝancoj kaj limigoj. Iom pri niaj praktikaj spertoj.*	23

ANTAŬ CENT JAROJ...

Elda *DOERFLER*

... LA *XVI ESPERANTO-WELTKONGRESS WIEN 1924.*





Centjara estas la supra PK, kies malantaŭo videblas sur la kovrilo. Cent jaroj pasis, Esperanto daŭre ekzistas kaj eĉ oni okazigis nian jaran feston en Afriko!

Mi emociiĝis tenante tiun karton enmane, ja pro ĝia aĝo sed pli ol tio, pro la bukedo da subskriboj apartenantaj al tiamaj eminentuloj. En la viena kongreso, laŭ la UEA-Jarlibro, ĉeestis 3 054 samideanoj, grandnombra partopreno, do! Normale, kiel okazas dum iu ajn kongreso aŭ E-aranĝo, homoj renkontiĝas, interamikiĝas aŭ refreŝigas siajn memorojn pri antaŭaj kundividitaj eventoj kaj jen - ni konsciu, ke tiutempe, ekzistis nek saĝtelefonoj nek tekkomputiloj! -, en iu bela, kunĝuata kongrestago ekestas la ĝusta momento por sendi al forestanta amik/in/o turisman karton, kun stampo kaj aŭtografoj.

La poŝtkarto estis sendita al la fama E-entreprenisto, S^{ino} Alice Farges el Lyon.



Jen la listo de la subskribintoj:

1) A.(ngèle Fallott) PRIVAT, unua edzino de
2) Edmond PRIVAT
3) Julia ISBRÜCKER
4) Charles H. EDMONDS
5) Klara ZAMENHOF (*vd. LVL 193 Aŭg. 2023*)
6) Lidja *aŭ* Lili ZAMENHOF
7) Salo GRENKAMP-KORNFELD
8) A. LÄUFER el Majence,
   plus alia subskribo nedeĉifrebla.

Antaŭ ol prezenti la esperantistojn malpli konatajn, notindas, ke dum la 16-a UK ne aperis - miascie - poŝtkartoj al ĝi dediĉitaj. Krom fotoj de grupoj de samideanoj, nenio alia aperas, ekzemple, ĉe la IEMW. Antaŭ kelkaj jaroj, vere tre speciala karto videblis dum ia periodo en la aŭkciejo *Ebay*, kies kosto estis surprize tre alta, tamen... mi estis tre tentata: ĝi valoris tiun monon. Sed mia monujo protestis, malhelpante sian malfermiĝon, tial nur *virtualaĵo* eniris mian kolektujon.



Tre, vere tre trafa bildo, ĉu ne? Kaj tre trafa kaj signifoplena la suba komento.

La kvin kontinentoj estis prezentitaj sur la eksplodontaj bomboj, kuŝantaj piede de sonorilturo, tiu apudstaranta la vienan katedralon Sankta Stefano.

Antaŭ dek jaroj oni ekbruligis el la imperiestra Vieno la kvin kontinentojn kaj nun je la dekjara datreveno de la mondmilito la popoloj de la kvin terpartoj serĉas en la XVI Esp. Kongreso la interkompreniĝon!

Prava diraĵo! Kaj nun, per lupeo, ni rigardu la subskribojn, unue tiujn de la plej konataj esperantistoj, pri kiuj malmulton mi skribos, ĉar certe ĉiu el vi scias jam ĉion pri ili:

LA GEEDZOJ PRIVAT






Gesinjoroj Privat en Moskvo.

Sur la ĉi-flanka foto estas Angéle Fallot, edziniĝinta kun Edmond Privat la 25-an de oktobro 1911 en Besançon: la bildo estis publikigita en *La Ondo de Esperanto*, februare 1912, okaze de la propaganda itinero tra Eŭropo ĝis Ruslando farita de la Privat-paro. Ŝi estis fervora esperantisto kaj ĝis 1925, jaro de ilia divorco, akompanis sian edzon dum liaj multnombraj preleg-vojaĝoj.

Kiel antaŭdirite, Edmond Privat estas ja tro bone konata kaj pri tia eminentulo nenion novan, diskonindan, mi povus malkaŝi. La karikaturo, farita de Jean Robert, ja tre klare priskribas nur etan parteron de lia biografio.





Julia Isbrücker

Kiu ne konas ŝin? Julia estis alia eminenta pioniro de nia movado, kiu aktiviĝis tuj post sia esperantistiĝo en 1909, verkante kune kun la frato interesan lernolibron. Naskiĝinta en Roterdamo septembre 1887, aperjaro de la internacia lingvo, ŝi distingiĝis per sia talenta kaj entreprenema agadmaniero. Ŝi estis membro de la Internacia Centra Komitato, de la ekzamenkomitato, fondinto kun Andreo Cseh de la Internacia E-Instituto, prezidanto de la Haga Klubo *Fine ni venkos*. Ŝi direktis kaj administris la Esperanto-domon en Arnhem, skribis artikolojn





kaj tradukis por la gazeto *La Praktiko*, instruadis, prelegis, verkis. En 1920 ŝi estis kunorganizanto de la unua postmilita UK, en Hago, post kvarjara halto.


Engaĝita en la pacifista movado, ŝi estis la unua prezidanto de la Universala Esperantista Pacifista Ligo (1923). Cele al formado de unu granda internacia forto por la paco, ŝi reliefigis la gravan rolon de Esperanto por unuigi ĉiujn pacmovadanojn tra la mondo. Inter alie ŝi organizis en Hago la Internacian Interreligian konferencon (1928). Reprezente la Universalan Ligon, mondfederista organizo, fondita en 1947 de ŝi kaj de A. Cseh, Julia Isbrücker intervenis en multnombraj internaciaj mondfederistaj kongresoj kaj konferencoj.

Sendube eminenta oratoro ŝi estis: ŝia sincera entuziasmo, ŝia pura idealismo, ŝia sinofera laborado nelacigebla akirigis al la E-movado sennombrajn kaj altvalorajn sukcesojn.

Havas egajn mankojn ĉi eta biografio pri s-ino Isbrücker, ne sufiĉus diklibro por listigi ĉiujn ŝiajn farojn: vere ŝia tuta aktivado plenigis aparte ampleksan ĉapitron en la historio de la internacia lingvo.

Kaj nun nomo ne tiom tutmonde fama, tamen inda je konatiĝo:

CHARLES HERBERT EDMONDS



Li aktive rolis en la Brita Esperanto-Asocio, ĉefe en la kampo de instruado, ene de kiu li okupiĝis pri korespondado inter lernantoj el aliaj mondaj partoj. Temis fakte pri tre interesa iniciato, nomita *Komerca eksperimento*, jam spertita dum la milito. La projekto estis starigi, samtempe, en kelkaj landoj, E-kursojn, daŭrantajn entute 25 instruhorojn, kies lernontoj prefere estu komercistoj-oficistoj diversspecaj. Tiuj kursoj devis okazi sub la aŭspicioj kaj kontrolo de reprezentanto de Komerca Ĉambro. S-ro Edmonds respondecis pri la tuta aranĝo kaj prezidis la Britan Komitaton por Internacia Komerca Lingvo. En la 1920-aj jaroj li estis ankaŭ honora sekretario de BEA kaj aperigis en ĝia oficiala organo *The British Esperantist* raportojn pri la asocia agado. Krome, li engaĝiĝis en la propagandado de Esperanto en la radiosfero.

En *Heroldo de Esperanto*, 09/05/1925, oni tre laŭdis lin pro lia grava helpo, financa kaj morala, malavare donita al la Internacia Radio-Asocio. Li estis redaktoro de la anglalingva gazeto *International Language*, pere de kiu li disvastigis nian lingvon inter la radioŝatantoj. Specialan numeron de la revuo li sendis al ĉiuj radiosendistoj en Britio kaj Francio, pli ol mil per-

sonoj, sekve de kio la BEA eldonis la *Internacia Radio-Manlibro*n, de li mem verkitan, kiu ricevis ĉies konsenton. S-ro Edmonds partoprenis kune kun E. Privat la preparan konferencon por internacia interkonsento pri radiofonio, okazinta en Ĝenevo, la 22-an kaj 23-an de aprilo 1925. Dum ĝi




Charles H. Edmonds amplekse parolis pri la uzo de Esperanto kiel helpolingvo kaj pri liaj propagandaj rezultoj.


Dum la malfermo de tiu konferenco, parolis inĝ. Maurice Rambert, prezidanto de la Svisa Radio Elektra Societo, kiu inter alie substrekis, ke “ni opinias necesa enmeti en la nunan konferencan tagordon la demandon pri uzo de internacia helplingvo por certaj disaŭdigoj de universala intereso. Ne ĉiu havas la privilegion scipovi la anglan lingvon por kompreni niajn Londonajn amikojn; aŭ la germanan por aŭdi konferencojn el Frankfurt aŭ Berlin; aŭ la ĉeĥan por interesiĝi pri la Prahaj disaŭdigoj…” “… Certe estas, ke Radiofonio, estante afero esence universala, devus nepre disponi pri internacia helplingvo kaj tuj evidentiĝas, ke Esperanto, kiu jam tiel disvastiĝis tra la tuta mondo, kapablus fari netakseblajn servojn…”. Dum la dua punkto de la tagordo, rilata al la uzo de Esperanto por radiofonio, intervenis s-ro Edmonds, reprezentanto de *Wireless World*, raportante i.a. ke la Brita Broadkasta Kompanio, administranta ĉiujn anglajn radiostaciojn, jam ekuzis tiun lingvon en diversaj okazoj, ankaŭ por disvastigi la paroladon de la Reĝo ĉe la ekspozicio de Wembley, por ke ĝi povu esti komprenata en la tuta mondo.

Vere aŭtentika malkovro de respektinda kaj diverstalenta esperantisto, kies tre ampleksa aktivado *estis formetita en la keston de forgeso*[Z]!

Sur la pk de la LVL-kovrilo la sekvaj aŭtografoj apartenas al niaj du karaj Zamenhof-inoj: KLARA, pri kiu jam estis parolite en la *LVL 193 Aŭg. 2023*



kaj LIDJA.



Rilate tiun subskribon, mi havas dubeton, nome ke Lidja subskribis per sia karesnomo, LILI, ofte uzata familie kaj amikronde. Pri ŝi aperis pluraj biografiaj artikoloj kaj libroj, tial nenio malkonata aldoneblas, nur mi deziras mencii, ke ŝi, naŭjara, eklernis Esperanton en ses semajnoj nur por povi kunveturigi kun siaj gepatroj al la 9-a

UK, Berno 1913. Kaj nun mi lasu la lastan parolon al Kálmán Kalocsay, kiu pentris ŝin poeme en la *Rimportretoj - Galerio de Esperantaj Steloj* (1931).




Lidja Zamenhof, kor' fervora,
Vartanta patran sent-heredon,
Jen, serĉas sorĉan sav-rimedon
Por mond' amara kaj dolora.

Kaj kun entuziasmo kora
Servadas la Bahaan kredon,
Lidja Zamenhof, kor' fervora,
Vartanta patran sent-heredon.

El sent' profunda, pens' valora,
En sino havas riĉan bedon,
El ili plektas florbukedon:
Novelojn kun enhav ' trezora,

Lidja Zamenhof, kor' fervora.

La antaŭlasta subskribo estas de SALOMON GRENKAMP-KORNFELD (ps. de *Salo Kornfeld*), juda-pola esperantisto naskiĝinta en 1896. Li eklernis la lingvon jam en la 1914-a jaro, kaj ekde tiam laboregis por ĝi. Lerta parolanto, elokventa oratoro, deklamanto, verkanto de poemoj kaj rakontoj, tradukanto el la pola kaj franca lingvoj, kunredaktoro de *Plena E-Vortaro* de SAT (1930-34) por kiu li prilaboris ĉiujn teknikajn neoficialajn radikojn, kunlaboranto de *Literatura Mondo* k.a.: de 1918 li posedis propran E-eldonejon *Esperantista Voĉo*, unue en Krakovo kaj poste en Jasło, kiu publikigis librojn liajn kaj de aliaj aŭtoroj, interalie ankaŭ de lia amiko Jakobo Ŝapiro. Ili, dum tri jaroj, kunredaktis la samnoman ĵurnalon. Li estis publicisto ĉe pluraj gazetoj en Francio kaj Pollando.



Grenkamp estis ankaŭ pioniro de la esperanta radio: li reprezentis Pollandon en la Internacia Kongreso pri Radiofonio de Parizo, en 1925. Julie 1939, Francio nonumis lin Kavaliro de Honora Legio.


Li gajnis kelkajn premiojn, ekz. okaze de la *Katalunaj Floraj Ludoj*, kvankam ne tiom laŭdita li estis de recenzistoj, kiuj aperigis ĝuste sur *Literatura Mondo* siajn malpozitivajn kritikojn. Tamen ĉiuj konsentis pri lia energia poresperanta laborado, dirante ke: "Li estas unu el la plej agemaj, multflankaj, fervoraj esperantistoj".



Bedaŭrinde la sorto rezervis al li vivofinon kruelan kaj senkompatan.

Ĉi-sube, el artikolo aperinta en la *Franca Esperantisto*, jan. 1949, titolita *Memoraĵoj pri Grenkamp-Kornfeld*, la kortuŝa konkludo de amiko el iliaj junularaj tempoj, Lucien Laurat (ps. de Otto Maschl), aŭstra ekonomikisto, verkisto kaj esperantisto, aktiva SAT-ano, amiko de Salo ekde la junulaĝo

... Nur tri jarojn poste mi eksciis pri lia kruela kaj tortura fino en koncentrejo. Li mortis sub la batoj kaj kuglo, de sovaĝaj brutaj barbaroj, kies cerbo rilatis al lia samproporcie kiel cerbo de simio al tiu de homo. Salo Grenkamp, la homo, kiu ne kapablis malami, kies tuta ekzistado estis dediĉita al amo por la homaro, perdis sian vivon sub la venĝofrapoj de koncentrita malamo.



Kaj nun ni alvenas al la lasta subskribo, tiu de

ALBERT LÄUFER

Mi trovis biografion 12-paĝan, germane verkitan de Karl Volk, kies titolo estas: *La forgesita Gremmelsbacher - Marianisto, instruisto, naturscienc-isto, muzikisto kaj esperantisto.* El tiu ellaboraĵo oni ekscias, ke li naskiĝis en la eta vilaĝo Gremmelsbach, en 1876, kaj mortis en 1938. Pri lia esperantisteco la aŭtoro informas, ke ne konatas, kiam li iĝis esperantisto, kaj ĉu li vizitis kurson aŭ lernis aŭtodidakte. Tamen K. Volk asertas en sia artikolo, ke li estis unu el la plej gravaj membroj de la E-movado. Partopreninto en pluraj kongresoj, A. Läufer estis en kontakto kun multaj esperantistoj el la tuta mondo, *eĉ kun komunistoj en Rusujo* [tiel!]. Pri Esperanto li zorgis rubrikon "Esperanto-paĝo" en la marianisma revuo *Nia Junulo.*



Por pluaj detaloj, jen la ligilo:
https://regionalia.blb-karlsruhe.de/frontdoor/deliver/index/docId/21396/file/BLB_Volk_Albert_Laeufer.pdf



Por via granda ĝojo, finiĝas ĉi longa tedaĵo, ankaŭ ĉar - bonŝance por vi - la lasta subskribo estis entute nelegebla. Ja, longa tedaĵo por vi, sed por mi la esplorado pri tiom klere nuancita areto da pioniroj, famegaj, famaj kaj malmulte konataj, kiuj en Vieno renkontiĝis, pasigis bonan tempon inter si, diskutis kaj planadis kune pri estontaj agadoj, por la progresado de *La Afero*. Ni ne forgesu tiujn, kiuj laboregis intense kaj senlace por tiu komuna celo kaj sen kiuj Esperanto ne estus akirinta tiom da valoraj rekonoj!

Traserĉado malkovrigas aŭtentikajn trezorojn, kiuj troviĝas ne subtere, en profundaj fosaĵoj, sed tute surface, je ĉies dispono, danke al tiuj, kiuj konservis la memorojn pri niaj antaŭuloj kaj transdonis al posteuloj en formo de ĵurnaloj, libroj, biografioj k.m.a., kiuj troviĝas en multenombraj arkivoj kaj muzeoj, zorge konservataj de privatuloj kaj institucioj, ne nur esperantistaj. Al tiuj iru nia ĉiama dankemeco, ĉar nunatempe, pli kaj pli profunde, eblas proprigi al si eĉ la plej malsciatajn detalojn de la Esperanto-Historio.

Noto: pri RADIOFONIO, konsilindas legi la majan kaj junian numerojn de la 1924 *International Language*, troveblajn ĉe subaj ligiloj:

https://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e2g&datum=1924&page=97

https://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e2g&datum=1924&page=121&size=45



UNUAFOJE INSTRUISTARO KONGRESAS EN BRAZILO!

La 57-a ILEI-Kongreso allogis ne nur pro la interesa temo: *Esperanto por justa edukado*, sed ankaŭ pro la beleco de la gastiganta urbo Maceió, lokita en la nordorienta parto de la lando kaj konata kiel “Rideto-urbo” - *Cidade Sorriso* pro la ĉiam ridetanta popolo kaj “Akva Paradizo” - *Paraíso das águas*, ĉar ĝi estas ĉirkaŭata de lagetoj, riveroj kaj eĉ oceano. En tiu paradiza loko la partoprenintoj estis infektitaj de tiu tipe loka *ridet*-viruso, precipe tiuj filatelistaj, ĉar bunta kaj ĉarme desegnita poŝtmarko aperis omaĝe al tiu evento.



Folio konsistas el 12 pm-oj; mezuroj de unu ekzemplero, memglua, egalas al 2,7 x 6,9 mm.

Alberto Coudo Fernandes, plurjardeka prezidanto

James Rezende Piton


Niaj poŝtkartoj kaj aliaj filatelaĵoj estas kvazaŭ tempo-kapsuloj, kiuj kaptis kaj konservas spurojn de niaj prauloj. Sed necesas flegi kaj revivigi la memoron, eĉ kiam temas pri nomoj, kiuj siatempe estis ĉie videblaj. La tempodaŭro de okdek jaroj post la forpaso vanuigas eĉ iam tre popularajn nomojn, kiel nia omaĝito, la brazilano **Alberto Couto Fernandes** [koŭto fernandis] (1871-1946). Ni malfermu la sigelojn kaj re-prezentu lin.

Naskiĝinta en la norda ĉefurbo São Luís (Maranhão), Couto Fernandes kiel multaj studentoj iris al la sudo, al la tiama ĉefurbo Rio-de-Ĵanejro, por daŭrigi sian studadon. Kun respublikanaj ideoj, li studis en Militista Lernejo de Rio en 1889, la jaro mem en kiu Brazilo fariĝis respubliko. Li diplomiĝis inĝeniero, kiel multaj pioniroj de Esperanto en Brazilo.

En la memorlibro porokaze de la fondo de la Brazila Klubo "Esperanto", en 1906, aperas lia subskribo. Li ne estis membro de la unua estraro, sed jam vigle kunlaboris per la instruado de Esperanto Lingva Komitatano dum jaroj, li verkis lernolibron, portugalan-esperantan vortaron, “Esperantan Radikaron - *oficialaj radikoj kun portugala traduko* (Eld. O Norte, Rio de Janeiro, 1922) kaj tradukis la teatraĵon “Amo per Proverboj”, verko de konata aŭtoro Artur Azevedo. Li cetere preparis paralelan version de brazilaj kaj esperantaj proverboj.

Diplomita en 1894, li eklaboris kiel inĝeniero kaj poste fariĝis teknika telegrafa direktoro ĉe la Brazila Poŝto. Oni trovas lian subskribon en kaŭĉuka stampo de la raraj tutaĵoj por la sistemo de pneŭmatika (aertuba) poŝto en Rio. Tiu ĉi ekzemplero uzita en 1915:




OBSERVAÇÕES.

A carta-pneumatica não deverá conter corpos resistentes, nem valores ao portador, nem objecto cuja remessa é prohibida pelo correio; deverá ser muito flexivel, para ser facilmente dobrada e introduzida nos cursores dos trens pneumaticos.

A carta-pneumatica que não satisfizer as condições regulamentares, será assimilada a uma carta ordinaria, e pagará como tal.

EXPEDITOR:

RUA: Ouvidor 263.

NOTA: A declaração do nome do expeditor é facultativa.

La datstampo kaj la linia stampo rilatas al la Telegrafa Departemento, kie Couto Fernandes estis vicdirektoro. Oni povus pensi, ke la stampo estas sur la tutaĵo ĉar Couto Fernandes estis la sendinto, sed tiel ne estas. Oni legas la internan mesaĝon kaj tio tute ne estis verkita aŭ koncernis lin. Oni trovas tiun lian stampon en ĉiu ekzemplero de tiuj kostaj tutaĵoj, kiuj troviĝas en la nuntempa filatela merkato.

De 1910 ĝis sia morto, li estis reelektita prezidanto de BEL, Brazila Esperanto-Ligo (tiam "BLE, Brazila Ligo Esperantista). Couto Fernandes havis gvidan rolon en pluraj societoj, i.a. katolikaj kaj geografiaj, sed Esperantujo estis lia plej ŝatata medio.

Li klopodis, por ke ĉiam estu delegito, ĉu iu esperantisto, ĉu diplomato en




La estraro de Brazila Esperanto-Ligo en 1914, kun tiamaj tre konataj aktivuloj. La prezidanto estis Couto Fernandes, kiu staras, maldekstre.

la reprezentado de Brazilo dum la Universalaj Kongresoj. Li mem neniam volis vojaĝi al UK-oj, kvankam li havis la rimedojn por tio.

Li emeritiĝis en 1933 sed konserviĝis liaj bonaj kontaktoj en la Poŝto. Mi hipotezas, ke Couto Fernandes ne volis altrudi Esperanton al la Poŝto uzante sian altan postenon, sed post la emeritiĝo li sentis sin tute libera pledi por Esperanto per esperantaj filatelaĵoj. Oni rimarku, ke tuj poste ekaperis la grandaj serioj de brazilaj poŝtaj tutaĵoj kun tekstoj nur en la portugala kaj en Esperanto, kun turismaj vidindaĵoj de Rio (la violkoloraj) kaj de Brazilo (la brunkoloraj).






Kaj sinsekve aperis tiom da brazilaj E-poŝtmarkoj: pri Specimenfoiroj en Rio (1935 kaj 1936), pri la brazila E-kongreso de 1936, pri la jubileo de Esperanto (1937), eĉ du samtempe por la brazila E-kongreso en 1945. Brazila Esperanto-Ligo ĉeestis la Unuan Internacian Filatelan Ekspozicion BRAPEX 1938 en Rio kaj E-lingva stampo produktiĝis.



Je paĝo 5-a, karto de la Unua Brazila Filatela Ekspozicio (1938) kun la pionire plurkoloraj poŝtaj stampoj, unu el ili en Esperanto. La karton Couto Fernandes sendis (verŝajne en koverto) al Francio, du monatojn poste.



Rio-de-Janeiro, 2/1/39

Estimata Samideano

Mi deziras al vi kaj al via Familio multe da feliĉoj dum la NOVA JARO .

KOrsaluton de

A Couto Fernandes

Prezidanto de B. L. E.

Li mortis en la 21-a de Aprilo 1946 kaj la novaĵo konsternis la brazilan esperantistaron. Samtempulo kaj lia posteulo, Lingva Komitatano (1932) kaj Akademiano ekde 1949, Carlos Domingues (1896-1974) registris, ke Couto Fernandes amis la esperantistojn kaj estis amata de ili. Multaj tiam pensis, ke la E-movado en Brazilo, pro troa dependeco de unuopulo, riskos eĉ ĉesi, kiel okazis en aliaj landoj. Iom troige, sed ni denove spertis similan senton pri "orfeco" pro subita perdo de aliaj grandaj tutlandaj aktivuloj, Symilde kaj Gilbert Ledon, komence de la 2000-aj jaroj.

Strato en la kvartalo Laranjeiras, Rio-de-Ĵanejro, kie Couto Fernandes loĝis kaj mortis, memorigas lian nomon kaj same estas en lia naskiĝurbo São Luís. Sur la tombo de Couto Fernandes, en la tombejo Sankta Johano la Baptisto en Rio, estas skribaĵo "Sub la sankta signo de l'espero kolektiĝas pacaj batalantoj".

Lastmomente trovitaj pri Salo Grenfeld-Kornfeld

Tute hazarde, aŭ, pli bone, antaŭe preteratentitaj, mi trovis, ke:

1) Post sia eksedziniĝo disde E. Privat, Angéle Fallot iĝis la vivkunulino de Salo G-K;

2) en *Itala Esperanta Revuo - maje 1924.* Salo Grenkamp-Kornfeld estis gasto de Trieste E-Rondo kaj, invitita de prezidanto Arturo Ghez, li elokventis antaŭ atenta ĉeestantaro pri la konferenco de Radio-telefonio okazinta en Genéve, kion sekvis lia deklamado el la poemaro *Krioj de l' koro*.

Poŝtkarto de

Harold Bolingbroke Mudie (1907)

Bert Boon kaj Marc Vanden Bempt

Averso:




Maldekstre: propaganda tabelo pri la Internacia Helpa Mono - sistemo de De Saussure, kun tabeleto por ĝustegaj kalkuloj.
Supre-dekstre: du verdaj poŝtmarkoj de duona “Penny” kaj stampo kun mencio de la londona urbokvartalo “Paddington” kaj la dato JA(NUARY) (19)07, 9.45h AM (antaŭtagmeze). Profila busto de reĝo Eduardo 7a, maldekstren.


Surskriboj: *“Universala Poŝta Unio/ POŜTKARTO/ Tiu ĉi flanko estas nur por la adreso”*. La adresato estas apenaŭ konata propagandisto P(aul) Cazeaux el Bordeaux (Francio).

Sube-meze: algluita oficiala glumarko de la tria Universala Kongreso 1907 en la brita urbo Cambridge.

Reverso:


Kara Samideano, 67 Kensington Gdns Sq W
Mi dankas vin por via longa & interesa letero, kiun mi ne povis tuj respondi pro la oftaj festoj de tiu ĉi jarsezono. Pro Borsaj aferoj, tre kredeble Londono estas iom pli malkara ol provincaj Francaj Borsoj, sed mi ne opinias ke estas multe da malsameco inter L & Parizo.
Pri la afero de Sr de B. mi neniel volis mallaŭdi lin pro io ne certigita de personoj jaluzaj. Mia avizo estas bazita sur leteroj de la Majstro mem, kaj kvankam mi ĉiam enkalkulis kaj ankoraŭ enkalkulas Sor de B. inter miaj plej bonaj Esperantistaj amikoj, mi devas konfesi ke mi havas absolutan konfidon pri la senpartieco & honesteco de nia kara estro. Ke li havas kaŭzon por plendi li ja certigas, sed nuntempe la afero pli bone sin aranĝas, kaj ni devos havi nenian skandalon pro afero kiu estis, kiam mi revenis en Novembro, proksimume krizo.
Kompreneble mi nur sendis tiun ĉi por montri al v
ke mi sciis pri la afero de la fonto kaj mi petas ke vi
konsideros mian pk. kvazaŭ konfidencian.

manskribitaj aldonoj: *... ke mi sciis pri la afero de la fonto kaj mi petas ke vi konsideros mian pk. kvazaŭ konfidencian. Korege sed rapide via*

HB Mudie (=  *)*

Tekstaj klarigoj:


- 67 Kensington Gdns (=Gardens) SW: la tiama loĝadreso de Mudie.
- L&Parizo = Londono kaj Parizo
- Sr de B = Sinjoro de Beaufront
- personoj jaluzaj (= ĵaluzaj): laŭ Marc Vanden Bempt probable temis pri lingvistoj kiel Couturat, Jespersen, Leau …, ĉar antaŭ 1907 de Beaufront estis tre aktiva verkisto kaj preferata "leŭtenanto" de Zamenhof.

Enhavaj klarigoj de Marc Vanden Bempt:

"Mudie skribas: '… novembre tiam mi revenis', kio situas lian leteron je la fino de 1907, do certe post la 'kunvenoj' de 15-24 okt. 1907, la jaro de la tiel nomata Ido-krizo. Laŭ mi pri tio temas la letero. 'Delegacio por la alpreno de lingvo internacia' tiam kunvene elektu kaj decidu pri diversaj proponitaj versioj de la lingvo. Zamenhof ne mem partoprenis, sed sendis

de Beaufront kiel delegito al tiuj kunvenoj, sed la partoprenantoj ne elektis la version de Zamenhof, sed version kun nombro da "plibonigoj". Tiu agado vere estis, kiel skribas Mudie, "skandalo", ĉar Zamenhof mem nenion sciis antaŭe pri tiu "Ido". Tial la movado malakordiĝis, kvankam finfine la 'stabila', fundamenta Esperanto de Zamenhof venkis. Ido montriĝis nur senĉese ŝanĝanta projekto sen firma bazo. La Ido-movado paŝon post paŝo pereis."

Harold Bolingbroke Mudie



George Cunningham, Harold Bolingbroke Mudie kaj John Pollen

Sinjoro Mudie [mjudi] naskiĝis en 1880 kaj mortis pro aŭto-akcidento en 1916 en Francio. Li estis angla esperantisto kaj profesia borsisto.

Mudie esperantistiĝis en 1902, leginte artikolon pri Esperanto en "The Review of Reviews". Li mem jam en 1903 fondis la gazeton "The Esperantist". Kiam ĝi kunfandiĝis en 1906 kun "The British Esperantist" li redaktoriĝis.

Kiel montras la foto li estis membro de la t.n. "Trio por la Tria", la LKK de la 3a Universala Kongreso de Kembriĝo en 1907.

De la Brita Esperanto Asocio li unuavice iĝis vicprezidanto, sekve de 1912 ĝis 1916 prezidanto. En 1908 li estis petita iĝi la unua prezidanto de UEA, tiam kun sidejo en Svislando. Pro lia retorika talento Eduardo

Stettler nomis lin “naskita prezidanto”. Zamenhof mem nomumis Haroldo-n membro de la unua “Lingva Komitato”.

Post kruela akcidento (kolizio de aŭto kun trajno) li estis entombigita en Francio (Forges-les-Eaux). Sur la tombo oni legas: “FILANTROPO PREZIDANTO DE BRITA KAJ UNIVERSALA ASOCIOJ DE ESPERANTO”.



L. L. Zamenhof, Harold Bolingbroke Mudie, Maurice Rollet de l’Isle kaj Joseph Silbernik en 1912

Louis de Beaufront (1855 – 1935)



Li estis la unua franca esperantisto kaj jam aliĝis al la movado en 1888. Louis eldonis en 1892 la unuan lernolibron por francoj. Krome li eldonis amason da esperantaj lernolibroj kaj alispecaj eldonaĵoj.

Li altiris aktive multajn eminentulojn kaj aliajn influajn personojn kaj diversajn asociojn. En 1894 li anoncis sin kontraŭ reformoj en Esperanto, tamen, en 1908 li anonime prezentis al la “Delegacio” sian projekton de reformoj sub la pseŭdonimo “Ido”.

Tio kaŭzis la “Ido-skismon” en la movado. Louis mem fariĝis poste ĉefa gvidanto de la Ido-movado.

p. 20-a

PLILONGIGITA "TURISMO"


James Rezende Piton (Brazilo)

En la katalogo Hirsch de Esperanto-filatelaĵoj, oni legas, ke estas registrita brazila maŝinstampo en Esperanto inter la diversaj varbstampoj uzitaj en la 1930-aj jaroj. Tiam uzataj por allogi al la plej konata brazila urbo en la mondo, la tiama ĉefurbo Rio-de-Ĵanejro, ili estis ne nur turismaj. Aliaj plurlingvaj varbstampoj reklamis ankaŭ la ĉefajn brazilajn eksportajn varojn.

La "nia", esperanta, temas pri la brazila stampo katalogita de Hirsch sub la numero "1V". La katalogo asertas, ke por tiu poŝtoficejo (Succursal n-ro 7, Distrito Federal, tiam en urbo Rio), la maŝinstampo "Rio - Turisma Urbo" funkciis tra la jaro 1937, de aprilo ĝis decembro. Filatela komercisto en Brazilo tamen havas tiun ĉi ekzempleron, kiu montras la stampon en uzo ankoraŭ en Januaro 1938:



Tamen al mia kolekto nun venis surpriza ekzemplero, multe pli posta, kun la dato 3-a de Julio 1943!



Ĉu tiu kliŝaĵo restis konservita kaj oni reaktivigis ĝin nur en 1943? Mi supozas tion, ĉar ekzempleroj de tiu E-stampo estas apenaŭ troveblaj en filatelejoj kaj aŭkcioj. Se la stampo daŭre estus uzata tra 6 jaroj, oni certe vidus ĝin pli ofte sur leteroj.

Tamen kio pri la decido varbi turistojn dum ruliĝas Mondmilito? Brazilo eniris ĝin en 1942 kaj oferis al Aliancanoj aerbazon en la nordorienta Brazilo. De septembro 1944 ĝis la fino de la milito, la lando sendis 25 mil soldatojn al Italio, por batali kontraŭ la landoj de la Akso.

de p. 18-a

Fontoj:

- Vikipedio
- https://eo.wikipedia.org/wiki/Ido-movado
- https://eo.wikipedia.org/wiki/HaroldBolingbrokeMudie
- Ludovikito: “Por kaj kontraŭ reformoj” 1980
  “Kiel esperanto venkis” 1989

Mi kore dankas mian amikon Marc pro la helpo kaj la kunlaboro!



Gravaj Esperanto-kolektaĵoj
Bonŝancoj kaj limigoj
Iom pri niaj praktikaj spertoj

Peter Zilvar

Dum kelkaj jardekoj ni kolektas seninterrompe la plej diversajn kulturmaterialojn - unuavice rilate al Esperanto.

A) Privataj spertoj:

Jam fine de la sesdekaj jaroj de la lasta jarcento mi regule kolektis diversajn materialojn rilate al Esperanto.

Unuavice mi interesiĝis pri poŝtmarkoj, historiaj bildkartoj, fotoj. Jam tre baldaŭ mi ekkolektis ĉe la multaj en- kaj eksterlandaj renkontiĝoj sonmaterialojn ekz. sur diversformaj diskoj, muzikkasedoj poste sur DVD-oj kaj KD-oj. Konstante mi faris fotojn en paperformo kaj en formo de lumbildoj (diapozitivoj).

Same mi kolektis film(et)ojn ĉe diversaj renkontiĝoj, kongresoj, de privataj eldonistoj, ktp. Poste mi filmis mem, ekzemple per la relative simpla filmsistemo Super-8.

Kelkcent el tiuj mi listigis kaj per ili kreis ludoliston. Sufiĉe multaj homoj el diversaj landoj interesiĝis kaj petis ekzemplerojn de nia Esperanto-Societo Sudharco kun sidejo en Herzberg am Harz (Germanio).

Same mi kolektis librojn, gazetojn. Regule mi mendis (per mia eta poŝmono) librojn ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (Nederlando).

Jam sufiĉe rapide mi arigis kelkcent diversajn librojn. Ĉe la multaj Esperanto-ekskursoj al najbaraj landoj mi povis konstante akiri novajn librojn kaj aliajn Esperanto-kolektaĵojn.

Unue mi kolektis ĉion en mia privata ĉambro, sed jam tre baldaŭ la spaco ne plu sufiĉis.

B) Asociaj kolektadspertoj:

Oni elektis min kiel estron de nia multflanke aktiva Esperanto-Societo Sudharco (Komunutila Asocio) en la jaro 1976.

Ni ne nur regule informis larĝskale en multaj gazetoj pri Esperanto, sed regule ofertis semajnfinajn kursojn, organizis fakajn seminariojn, gastigis homojn el multaj landoj, ktp. Kaj tamen ni ne forgesis akiri konstante novajn kaj malnovajn diversspecajn Esperanto-kulturmaterialojn, parte per privata mono kaj parte jam per la kaso de nia Esperanto-asocio.

Ankaŭ al kursanoj ni montris la materialojn kaj jam rapide ankaŭ multaj komencis kolekti diversajn Esperantaĵojn, ekzemple rilate al filatelo, turis-

maj broŝuroj, varbiloj, lernolibroj, romanoj, ktp. Ni tre ĝojis pri la evoluado kaj pri la novaj interesitoj resp. “freŝbakitaj esperantistoj”.

Bedaŭrinde, laŭ mia persona sperto, por multaj esperantistoj la Esperanto-kolektaĵoj havas “negativan guston”, ĉar - ili argumentas - tio ja nur taŭgas por kolektemuloj. Plie la plej multaj esperantistoj interesiĝas nur pri lernolibroj kaj romanoj, sed ne pri la riĉa kaj parte raraj historiaj kulturvaloraĵoj. Preskaŭ neniu (krom arkivistoj kaj muzeaj specialistoj) interesiĝas pri tio. Alia problemo estas, ke multaj Esperanto-kolektantoj maljuniĝis.

Oni nepre bezonus kaj bezonas novan kleran kaj edukitan Esperanto-generacion.

Tamen bonas, ke ankoraŭ ekzistas kelkaj muzeoj, kaj oni eĉ fondis novajn kiel en Kroatio, Ĉinio kaj Japanio.

Tio povas esti taŭgaj Esperanto-Centroj por fortigi stabilan “Esperanto-kernon”. Komuna kolektado, ordigado, fakaj prelegoj, ktp. helpas krei novajn komunumojn.

C) Ankoraŭ nova Esperanto-defio: Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo

La spertoj kreskas kaj oni ne perdu la superrigardon. Antaŭ ĉ. 21 jaroj ni konstrue aldonis la superan etaĝon de la Esperanto-Centro en Grubenhagenstrato, 6 en Herzberg.

Multaj aŭdis pri tio kaj donacis al ni librojn, gazetojn, ktp. Ni organizis kelkajn fakseminarojn, ekzemple pri Esperanto-filatelo, medaloj rilate nian lingvon, kaj historiaj poŝtkartoj.

En la supra parto de la muzeo de nia surloka Welf-kastelo ni ricevis danke al nia Esperanto-urbo konstantan ekspoziciejon. Momente tie okazas la jam 18-a fakekspozicio rilate al Esperanto. Jam kelkdekmil homoj el multaj landoj rigardis la diversajn ekspoziciojn, dume ili ricevas informojn pri la lingvo kaj krome kunprenas gazetojn, varbilojn, ktp.

Dume, danke al grandkvantaj donacoj kaj privataj aĉetoj, niaj “E-kulturvaloraĵoj” apartenas al la plej grandaj resp. ampleksaj kaj multflankaj en la mondo.

Almenaŭ pli ol 13.000 diversaj Esperanto-libroj jam estas listigitaj, kelkdek mil gazetoj kaj informiloj. Certe nia asocio posedas la plej grandajn kolektaĵojn rilate al libroj brajle skribitaj, historiaj turismaj broŝuroj, filmoj, muzikmaterialoj, k.a. Evidente ankaŭ niaj, ankoraŭ ne tro ordigitaj, kolektaĵoj pri la riĉa E-filatelo, medaloj, pingloj, glumarkoj ktp. apartenas al la plej ampleksaj en la mondo.

Vere grandas niaj kolektaĵoj rilate al fruprintaĵoj kaj t.n. Esperanto-inkunabloj. Pri tio ni aparte fieras, ĉar ili tre valoras. Ofte private ni devis

pagi vere altajn sumojn ĉe diversaj eŭropaj aŭkciaj domoj, antikvaĵejoj, ktp. Amuze, ke ĉe diversaj gravaj aŭkcioj nur lastmomente aperis pluaj kunofertantoj por akiri la ŝatatan Esperanto-raraĵon. Tiam draste altiĝis la aŭkciaj prezoj.

Danke al nia speciala Esperanto-urbo ni havas ankaŭ grandan Esperanto-librosekcion en nia urba biblioteko kaj du kromajn ejojn en aliaj urbo-domoj. Tie ni stokas unuavice multoblaĵojn, varbilojn, ktp.

De tre multaj Esperanto-materialoj ni havas tiel nomatajn duoblaĵojn. Ni povus ŝanĝi tion. La Esperanto-urbo estas tre kunlaborema rilate al starlokoj, komprenemo, valoraĵoj, ktp. Nia plej granda problemo estas kompetentaj "homfortoj". Por tre multaj taskoj kaj novaj regionaj Esperanto-bonŝancoj mankas almenaŭ dek diversaj Esperanto-specialistoj, kiuj kun ĝojo povas kaj volas helpi resp. kunkonstrui veran "Esperanto-model-urbon", ankaŭ por multaj alitipaj povumoj kaj servoj.

Vivu Esperanto en reala medio kaj publiko! Bonvenon!

Kore kaj samideane salutas *Petro ZILVAR*





Aldonita noteto de ED

En 2009 okazis, de la 28-a de majo ĝis la 3-a de junio, en la Esperanto-urbo du kongresoj: tiu Eŭropa, la 8-a, kaj la 36-a Germana.

La loka filatela klubo, kunlabore kun ICH, mendis specialan tutaĵon por la du eventoj. Sur tute elegante satenita koverto estas presita pm, je 0,55-eŭra nominalo, sur kiu aperas la E-flago kun la skribo, *Bonvenon en Herzberg am Harz La Esperanto-urbo*, kaj la emblemo de ICH kaj grafikaĵo de la urba kastelo; sur la stampo videblas la komuna emblemo de la du kongresoj: interkrucitaj EEK kaj GEK, plus anonco pri ekspozicio titolita *Esperanto kaj Filatelo*.





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:
Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE
testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:
IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta
BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler
UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx-r
Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.
Kunredaktantoj: James Rezende Piton - sudastelaro@gmail.com
Albert Boon, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be
Elf-Arek ttt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

HAROLD BOLINGBROKE MUDIE

Profitante de la belega artikolo pri H. B. M., verkita de nia samligano Albert Boon, mi aldonas ĉi foto-pk-n faritan okaze de renkontiĝo kun rumana esperantistaro, kies prezidanto estis Emile Nikolau (unua dekstre). Inter la du virinoj, videblas la unua UEA-prezidanto, je kies dekstra flanko sidas lia patrino. *Bukuresti, 4. Sept. 1912*

